

POLA

XXX
JARO

MARTO
1936

3
NUMERO

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
WYDAWCA

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

Ni imitu aliajn!

Kiam proksima estas la inaŭguro de unu mondkongreso, tiam devas jam ek-labori pri la sekvonta kongreso ĝiaj organizantoj.

Tiel okazis ĉiam. Plej ekzemplodonaj estis la organizantoj de la 28-a. Jam dum la malfermo de la 27-a en Romo, la kongresanoj estis informataj buŝe kaj skribe (per speciala ĵurnalo) pri la plena kaj preta programo de la 28-a. La kongresanoj estis surloke informataj pri la sana kaj sukcesa evoluo de la Esp. movado en la lando de la 28-a. La verda armeo de la lando, en kiu estas okazonta la 28-a, povis prezenti aron da sukcesoj atingitaj sur la Esp. kampo dank' al fervora laboro kaj favora rilato de ties registaranoj.

50 jaroj estos baldaŭ pasintaj ekde apero de mizera eta broŝuro, enhavinta projekton de lingvo helpa internacia kun ne kun ĝia gramatiko kaj malriĉa vortaro. La eta broŝuro poiome akiris amason da ĝiaj posedantoj, amason da ĝiaj uzantoj, amason da ĝiaj disĉiploj. La eta broŝuro naskigis broŝuregojn, libretojn de alta kultura nivelo. La eta broŝuro kaŭzis ekeston de nova popolo kun propra lingvo, historio, literaturo, moroj ktp.

Kaj ĉi broŝureto havis lokon de apero, ne alian kiel en nia ĉefurbo. La gravan valoron ni devis scii kiel taksi. Sed bedaŭrinde ni iom po iom deturnas la atenton de la tuta afero, kiun minacas pereco en nia lando.

Pereco de verko, alportinta — anta — onta egan bonon al la homaro, en la

lando de ĝia naskiĝo! Ĉu ne sonas strange! Jes, tiel antaŭvidiĝas, se ni ne penos savi la nunan situacion.

50 jara jubileo de Esp. kaj 29-a Universala E-Kongreoso. Ambaŭ festoj estos solenataj post 1½ jaro en la tuta mondo. Sed la ĉefa soleno ja okazos en nia ĉefurbo, la naskiĝloko de Esp. kaj loĝurbo de nia Majstro.

Ĉu ni estos pretaj, dum la 28-a en Vieno, prezenti plenan kaj pretan programon de la 29-a en nia lando? Ĉu ankau ni povos montri al la tutmonda Esperantistaro sanan kaj sukcesan evoluon de nia afero en nia lando, aperloko de la unua broŝuro?

Laŭ la nunaj preparoj de la organizantoj, laŭ la laboro de niaj pioniroj, grupoj, rondoj, societoj ktp. tio ne antaŭvidiĝas.

Ni legas pri plano farita de la Sveda E-Asocio, celanta kunigi ĉiujn fortojn kaj per kuna laboro atingi sukcesajn rezultojn sur la Esp. kampo en sia lando ĝis la 50-jara jubileo de nia afero.

Ĉu ne ni devis estis la unuaj, kiuj faru kaj plenumu tiajn planojn, sed en pli granda skalo, ĉar ni ja troviĝas en la lulilo de Esperanto?

Ni legas, ke 500 svedaj kaj multaj alilandaj ge-s-anoj jam pensas pri alveno al la festurbo dum la jubilea jaro.

Kaj ni... silentas.

Ni, kiuj devas inde prezenti la movadon de Esp. en ĝia naskiĝlando, ni, kiuj devas akcepti centojn da verdaj kavali-

roj el ĉiuj terpartoj ni, kiuj devas esti ekzemplodonaj por aliaj, ni silentas.

Nun ni ekdisputas. Ni nun ankoraŭ ekvekas al laboro. La kongreso, destinita en nia ĉefurbo, ja sendube okazos, sed koncernas nur en kia formo.

Tial ni ne plu atendu! Ni ne plu diskutu! Ni tuj eklaboru en la ĝustaj direktoj!

Kuniĝu niaj koloneloj, oficiroj, kaporaloj kaj simplaj soldatoj por kune atingi fruktodonajn rezultojn!

Austataŭ la malgajaj artikoloj en nia organo, ni prefere eklegu pri sukcesaj

rezultoj de la preparaj laboroj al la granda festo.

Ankaŭ ni penu prezenti dum 28-a plenan kaj pretan programon de la granda festo! Ni montru al la mondo, ke ni estis indaj organizi la grandan feston.

For la dormon! Ek al laboro! Ni ja juris labori, ni juris batali!

La 50-jara jubileo de Esp. kaj la 29-a Universala E-kongreso, estu la ĉeftemo de la tutpollanda kongreso de Esp. en Krakovo!

Se ni ne povas estis ekzemplodonaj por aliaj, kiuj imitus nin, almenaŭ ni imitu aliajn!

J. Szuster (Wilno)

Pasteur, Lister kaj Koch kreintoj de la nova medicina scienco.

Radioprelego de prof. dro Odo Bujwid, disaŭdigita la 7. I. 1936.

Antaŭ kelkaj monatoj Instituto de Pasteur en Parizo festis la 50-jaran jubileon de malkovro unu el plej gravaj en la medicino: la metodo de kuracado de hidrofobio. La malsano terura, kiu sekvas la ekmerdon de homo fare de hidrofobie malsana hundo. Ĝis tiam tiu malsano ne estis kuracebla kaj en multaj kazoj post la vundigo pere de malsana hundo finiĝadis tiam per morto de vundita homo. En la jaro 1885 Pasteur unuan fojon aplikis al la mordita de hidrofobie malsana hundo, malgranda knabo Jozefo Meister, sian noveltrovitan kuracilon.

Depost tiu historia fakto, kiu post la malkovro de Jenner estas la dua grava fundamenta profilakta rimedo, komenciĝas nova epoko en medicino, baziĝas sur la novaj sciencaj malkovroj de du viroj, kies nomoj brilas en la nova medicino: Louis Pasteur kaj Robert Koch, al kiuj oni devas ankoraŭ aldoni la trian nomon de Josef Lister, kiu la unua aplikis praktike la sekvojn de Pasteuraj malkovroj en kirurgio.

Antaŭ du jaroj aperis franclingve skribita libro „Trois fondateurs de la médecine moderne“ kun antaŭparolo de dro Burnet, en kiu konata scienculo Elie Mechnikov priskribas la meritojn de tiuj tri grandaj homoj. Mi nun sekvas parte la skribitan libreton, parte preparolos miajn proprajn memoraĵojn pri la tri grandaj homoj, kiujn mi havis feliĉon ne nur ekoni persone, sed eĉ laboradi kune kun ili dum mia juneco.

Se ni komparas la staton de niaj scioj pri infektaj malsanoj antaŭ kelkdeko da jaroj, se ni ekzemple kun Mechnikov tralegos la priskribon de la milito de Francoj kontraŭ Rusoj en 1854, ni ekscios te-

surajn rezultojn de tiamaj militaj vundoj kaj malsanoj. Franca armeo perdis tiam el 300.000 homoj 10.000 pro mortoj dum batalado, sed 85.000 pro diversaj malsanoj postoperaciaj kaj aliaj infektaj: ĥolero, tifo, k. a. Rusa armeo perdis laŭ Ĉenu 20 foje pli pro infektaj malsanoj ol post la batalo kontraŭ malamiko, sur batalkampo. Kirurgiaj operacioj regule finiĝadis per morto post la infekto de gangrenoj, tiamaniere, ke operacioj estis pli danĝeraj ol restado sen operacio, hospitaloj kaj operaciaj ejoj estis ejoj de morto, ne de sanigo.

Tiu terura stato estis sekvo de komplete nescio de kaŭzoj de infekto. Tute alie prezentis sin la operacioj dum la lasta granda milito, kiam vunditaj soldatoj ofte tuj post la resaniĝo revenadis en batalkampon, ĉar infektaj vundoj preskaŭ ne ekzistis, aŭ se estis infektitaj oni ricevadis kontraŭinfektan serumon, kiu preskaŭ ĉiam bone efikis.

Milito cetere estas ĉiam kruelaĵo. Saniĝanta militisto antaŭe estis ofero de infekto. Nun li estis tri- aŭ kvarfoje kuracata el la militaj vundoj, sed revenadis en batalkampon kaj fine estis mortigata.

Nia hodiaŭa civilizo ne estas ankoraŭ tiom matura, kiel estas necese por vere frata kunvivado de nacioj. Homo restas ĝis nun tro besteca.

Sed ni revenu al la temo.

Ĝis la malkovroj de Pasteur, nome ĝis la jaro 1857 oni tute ne komprenis la kialon de infektaj malsanoj. Pasteur la unua pruvis antaŭ ĉio, ke fermentado de lakta sukero estas sekvo de vivantaj organismoj — mikroboj. Li pruvis ankaŭ,

ke neniam ŝanĝo de organa materio povas fariĝi sen vivantaj aĵoj, ke ne ekzistas „generatio spontanea“, sed diversaj malgrandaj mikroboj, kiuj povas esti mortigitaj pere de pli alta temperaturo, ke boligita buliono de viando, solvaĵo de sukero k. aliaj materioj ne povas ŝanĝiĝi sen aldono de vivanta mikrobo. Poste Pasteur pruvis, ke diversaj malsanoj ekz. la karbunkolo (*Pustula maligna*) estas sekvo de ago de bacilo de antrakso, jam antaŭ deko da jarcj observita de Davaine, Rayer kaj Pollender. La nomitaj aŭtoroj observis la sangon de bestoj mortintaj de tiu malsano, sed ne povis doni decidan pruvon, ke la observataj malgrandaj bastonetoj estas kaŭzo de malsano. Hemiistoj kaj ĉefe Liebig, konata sciencisto, tute kontraŭdiris tion. Estis necesa, kiel dirite, decida pruvo; tion faris Pasteur kaj Koch, kiuj el la guteto de sango kulturis bacilon, kiu post multaj generacioj restis mortiga sen iu ajn alia restaĵo de sango. Ambaŭ sciencistoj, Pasteur kaj Koch donis tiun decidan pruvon, aplikante metodon de puraj kulturoj, kiu estis tute ne konata ĝis tiam tempo. Tiuj ambaŭ sciencistoj povas esti nomataj patroj de nova scienco, nomata bakteriologio aŭ mikrobiologio, ĉar ne ĉiuj mikroboj estas biologie bakterioj kaj inverse.

Antaŭ Pasteur kaj Koch oni konstruis diversajn teoriojn pri malsanoj. Inter aliaj estas teorio de Virchov, kiu opiniis, ke la kaŭzo de malsano estas en la ĉelaro de organismo. Diversaj ŝanĝoj en la mikroskopa kaj ĉemia konstruo de ĉeloj kaŭzas malsanon. Estis ankaŭ aliaj sciencistoj, kiuj asertis, ke la kaŭzo de malsano devas esti ekster la organismo. Konata germana sciencisto Henle, jam antaŭvidis malkovrojn de Koch kaj Pasteur. Sed mankis tiam decida kultura pruvo. Aliaj eĉ faris pruvojn, sed tiel mallerte konstruitajn, ke oni facile povis renversi ilin, pruvante, ke ili ne estas taŭge faritaj. Ekzemple Hallier faris kulturojn, sed tiuj kulturoj neniam estis sufiĉe puraj.

Ambaŭ vere meritaj viroj donis tute ekzaktajn pruvojn, kiuj ne povis esti faligitaj. Ili malkovris bakteriojn de diversaj malsanoj kaj starigis bazojn de la nova medicino. Ne estas ĉi tie loko kaj tempo enprofundiĝi en detalojn, sed estas necese karakterizi la manieron de agado. Koch montris preskaŭ samtempe kun Pasteur kulturon de antraksa bacilo, b. de tuberkulozo, ĥolero kaj kel-

kajn aliajn. Li provis malkovri la profilaktan metodon kontraŭ tuberkulozo, sed li ne sukcesis. Lia tuberkulino ne estis por tiu celo taŭga, ŝkiel pruvis multaj eksperimentoj. Do la malkovroj de Koch havas grandan sciencan kaj teoriaran valoron, helpis nin eltrovi perantajn metodojn de profilakso, ĝenerale ne specifajn. Dank' al Koch ni scias verajn kaŭzojn biologiajn de malsanoj, kiuj povas esti facile neniigitaj. Dank' al Koch ni ne timas nun la epidemion de ĥolero, tifo k. a., ĉar ni povas facile neniigi fontojn de infekto: purigi la akvon, saniigi la terenon, seninfektigi la ĥirurgiajn instrumentojn.

En tiu direkto ni devas ankoraŭ konstati grandan meriton de Lister, kiu la unua enkondukis en la ĥirurgion la fenolon, karbolan acidon, sin bazante sur la Pasteura malkovro de putrigaj bakterioj.

Lister aplikis la fenolon en Glasgova kaj Edinburga hospitaloj, kie sekvdadis erizipelo, hospitala gangreno, sepsaj infektoj kaj rimarkis, ke tiamaniere oni povas limigi tre grandan postoperacian mortemon. Tiamaniere li estas patro de la dezinfektado, kiu estis unua paŝo por seninfekta agado kaj tiel nomata asepso. Teruraj estis la sekvoj de antaŭe uzataj ĥirurgiaj metodoj. Ni jam citis la ekzemplon dum la antaŭaj militoj. Ni ne povas imagi tiomajn suferojn de malsanuloj. Malsanulejoj estis tiam veraj buĉejoj kaj ne estas mirinde, ke ankoraŭ nun oni havas antaŭjuĝan timon kontraŭ malsanulejoj.

Dank' al Lister ambaŭ malsanulejoj en Glasgov kaj Edinburgo estis la unuaj brilaj ekzemploj de plej grava ŝanĝo en la ĥirurgiaj metodoj.

Pasteur havis antaŭ si ĉiam la praktikan celon de siaj sciencaj malkovroj. Eltrovinte la kialon de malsano, de eksto de diversaj ĥemiaj fluidaĵoj, biero kaj vino, li eltrovis la profilaksan metodon por eviti malsanon de silkraŭpo, poste li eltrovis la vakcinon de birda ĥolero, de bakteria porkmalsano (*rouget du porc*) kaj ankaŭ vakcinan metodon kontraŭ antrakso. Post tiu malkovro inter Pasteur kaj Koch eksplodis vera scienca batalo. Koch, kiu sekvis la pensmanieron de sia majstro, botanikisto prof. Cohn, ne volis aprobi la pensmanieron de Pasteur, kiu konstatis, ke la bacilo de antrakso povas iĝi malfortigita kaj servi kiel vakcino kontraŭ forta viruso. Pasteur, kontraŭe, estis certa, ke li pravus, ĉar liaj pruvoj sur la eksperimentaj bestoj donis al li sufiĉe for-

tan bazon por tiu aserto. La batalo finiĝis je venko de Pasteur kaj la homaro ricevis novan bonfaron de bakteriologia scienco. Depost tiu malkovro de Pasteur oni komencis apliki la antraksan vakcinon kontraŭ antrakso de brutaro en multaj landoj, hodiaŭ la metodo estas ĉie jam delonge akceptita.

Sed la plej grava malkovro de Pasteur estas la malkovro de kontraŭrabia inokulado de malfortigita hidrofobia viruso.

Tiu metodo estis en tiu tempo tute ne komprenita kaj elvokis multajn kontraŭajn opiniojn en Francujo mem kaj en aliaj landoj. Profesoroj de diversaj medicinaj fakultatoj, inter ili ankaŭ fama Billroth skribis artikolojn en gaze-

toj, kontraŭbatalante la Pasteuran metodon. En tiu tempo mi post miaj studoj ĉe Robert Koch en Berlino vizitis Parizan Ecole Normale, kie Pasteur faris siajn unuajn eksperimentojn kaj aplikis la metodon kun bona rezulto. Atakoj kontraŭ lia metodo Pasteur'on grave suferigis kaj li ofte parolis pri homa nejusteco kaj malkomprenemo. Mi eĉ opinias, ke tiuj atakoj kaj insultoj malbone efikis sur la malforta sanstato de la granda sciencisto, kiu tro suferis.

Sed la vero devas venki kaj venkis.

Mi aldonas nur, ke en Polujo oni komprenis la grandan meriton de Pasteur. La unua Pasteura instituto estis fondata en Warszawa en la sama jaro, kiam Pasteur ekaplikis sian metodon.

AL LINGVA ESPLORO.

En januara numero de Pola Esperantisto mi trovis iajn korektojn aŭ opiniojn de s-ro L. Dreher, kiujn mi trovas ne plene ĝustaj. Ekzemple en frazo: „pri kiu neniu zorgis preter maljuna servistino“ — mi uzus ne „ekster“, sed „krom“. Ĉi tie estus necese substreki diferencon de „preter“ kaj „apud“, kiu atribuas al „preter“ senco transiran: oni ekzemple ne povas „preterstari“.

Sed speciale mi volas atentigi pri kunmetitaj vortoj. Troa ilia uzado eble ne estas dezirinda, laŭ stilistika vidpunkto, sed tio ne povas esti farata malutile por ekzakteco. Facileco de tia vortfarado kaj tiamaniere akirita subtileco de nuancoj estas unu el ĉefaj atributoj kaj avantaĝoj de nia lingvo kaj tio estas plej grava. Kunmetitaj vortoj ne prezentas plenekzakte sumon de ideoj, kiel opinias s-ro L. Dreher. Tio ne estas matematiko — kie loko de adiciato ne ludas rolon. Se laŭ li „sopiratendi“ samsignifas kun „atendsopiri“, kion li esprimas en sia prefero de la unua vorto,

tiam sopiratendo = atendsopiro. Do atendo de sopiro samsignifus kun sopiro de atendo. Mi pensas, ke el la lastaj esprimoj estiĝos tute klare, ke en la unua — vorto „sopiro“, kaj en la dua — „atendo“ ludas ĉefajn rolojn — kaj la aliaj nur akcesorajn, adjektivajn, nuancajn. Tiel instruas nin gramatiko, kaj tial atendsopiro estas ĉiam nur sopiro (pro atendo —, oni ja povas sopiri, ne atendente), kaj sopiratendo estas nur atendo. Do estas ja du vortoj nur kun proksima, sed ne la sama, senco, kiel ekzemple ŝirtiri — targać, kaj tirŝiri — szarpać.

Plue: pri vortoj sekvanta, sekvinta, sekvonta, posta mi preferus nur sekvontan aŭ postan, sed ne sekvantan, ĉar mi povas vidi ekz. sekvantan aŭtomobilon, sed neniam tagon, ĉar ĝi estas tempo-difino. Plue, kial ni enkonduku novan radikon „negi“ se ni havas la alian: ĉu ne „kontesti“? (Grabowski).

ing. M. Chmieliński
Łódź.

KONSILO POR KURSGVIDANTOJ.

Por kursgvidantoj laŭ rekta (ekz. Cseh-metodo) metodo mi rekomendas ĉi-suban metodon, de kelkaj jaroj sukcese de mi uzatan, kiu koncernas vortarigon de dumlecione notitaj vortoj. Lernanto devas antaŭe aranĝi por si du vortaretojn: unu esperante-nacilingvan kaj duan nacilingve-esperantan. Por ĉiu litero en la vortaretoj devas esti antaŭdestinita konvena nombro da linioj laŭ antaŭe de instruisto prilaborita materialo. Tiu ĉi nombro devas esti antaŭ leciono diktita al la lernantoj por ambaŭ vortaroj apar-

te. En duono de la leciono (aŭ ĉe ĝia fino) instruisto faras paŭzon, dum kiu li diktas por ĉiu instruita nova vorto koncernajn, signifantajn lokon en la vortaroj, ciferojn, kiujn lernanto starigas apud la vortoj parenteze. Ekzemple: patro — ojciec (20, 15); diktante tiujn ĉi ciferojn el sia speciale antaŭpreparita vortaro, instruisto notu kolorkrajone apud la vorto en la vortaro ciferon de sinsekva leciono, dum kiu la vorto estis instruita. Hejme la lernanto enskribas tiun ĉi vorton en esp-epolan vortaron.

sur 20-an linion en litero P jene: 20) patro — ojciec, kaj en la poleesp-an sur linio 15-a sammaniere: 15) ojciec — patro.

Tiu ĉi disordigado de la vortoj laŭ vortaroj estas unu el ĉefaj prilaboradoj de instruita materialo, ĝi postulas atenton kaj fiksas ilin en memoro.

Avantaĝoj de tiu ĉi metodo estas jenaj:

- 1) En la vortaroj ĉiam estas nur instruitaj vortoj do la serĉadon malhelpas nenia nekonata vorto.
- 2) la serĉado estas faciligita kaj tial ne forrabas longan tempon, se dum ĝi oni trafas aliajn vortojn, do nur jam

instruitajn, kio nur helpas al il'a parkerigo,

- 3) Instruisto scias ĉiam, ĉu ia vorto estas instruita kaj eĉ kiam, kaj povas pere de statistiko de ĉiulecione instruitaj vortoj orientiĝi en liverado de la novaj,

- 4) Parkera lernado de vortoj estas multe malgrandigita.

Tiamaniere dum ĉirkaŭ 30 lecionoj estas instrueblaj proksimume 1250 radikoj, en lasta leciono tiu ĉi vortprovizo estos kompletigita per neinstruitaj, sed pli malpli bezonaj vortoj.

ing. M. Chmieliński
Łódź.

HIERONIM DERDOWSKI.

De moŝt' Ĉorlinski al Puck pro retoj vojaĝo.

En la traduko pri Ĉorlinski, en la februara n-ro de P. E., troviĝis jenaj eraroj:

1) En la titolo mankas apostrofo ĉe la vorto: moŝt'

2) paĝo 21: La insurekcio sub Mierostawski estis en la jaro 1848

3) sampaĝe 8-a linio de malsupre la nomo devas esti Mŝcug (ne: Lŝcug).

(FRAGMENTO EL LA III LIBRO).

Ne povante laŭ sia gusto elektaceti la retojn en Puck entreprenas Ĉorlinski surmaran vojaĝon al Jastarnia.

... Jam foriris marvojistoj. Muja paŝis fronte. Ili haltis ĉe marbordo tuj ensipiĝonte.

Tie svarmis kelkaj viroj por prizorgi maston kaj enmeti sur ŝipfundon pezan ferbalaston.

Tiam sipo plisargita ekvilibre naĝas.

Same faras la fiŝisto, se li akvvojaĝas.

La nobel' adiaŭinte edzinon surborde

Lasta iris en boaton kaj sidiĝis orde.

Homoj pene je ŝnurego feran ankron tiras.

Ŝip' foriĝis — kaj edzino kontraŭ land' reiras.

Si sin turnis al preĝejo, preĝis ĉe l' altaro,

Ke la edzo ne pereu dum la voj' sur maro,

Ke ne tuŝu lin dumvoje malbenata forto,

Aŭ ne jetu marprofunden el boat' la sorto.

Si eĉ iris al paroĥo, ne ŝparis donacon,

Ke paroĥ' de l' Di' elpreĝu por la edzo gracon.

Li sentime ĵus veturis sur arke' kaŝuba

Kaj rigardis tutĉirkaŭen kun vizaĝ' sennuba.

Jam boato estis preskaŭ ĉe la vojduono,

Vel' ŝveliĝis orienten pro la ventsezono.

Ie sur la horizonto ŝipoj jen vidiĝas,

Dekstre el la kontinento tera lang' eliĝas.

Ĉe komenco ĝi mallarĝa poste iĝas vasta,

Kaj jen fore sur terpinto tur' elstaras lasta.

Do demandas nun Ĉorlinski, kia jen mirajo.

Muja diras, ke ĝi estas Hela landŝtrajaĵo.

.MI SCIPOVAS".

En la januara numero de P. E. la lingvesploristo ne povas konsenti, ke la kunmetaĵo de du verbaj radikoj faras bonan impreson; li asertas, ke tiamaniere kunmetitaj vortoj ne formas ĝustadire novan ideon, sed sole la sumon de ambaŭ. Por plifortigi tiun opinion li citas porekzemple la vorton: scipovi, kiu sonante eĉ bone estas strange nekomprenebla por multaj.

Kaj tie ĉi mi diras: stop! Ĉar se mi volas iun aserton konfirmi per ekzemploj, mi devas elekti ekzemplon ĝustan, senriproĉan, klaran, kaj ne ĵus strange nekompreneblan.

Mi konsentas, ke „scipovi“ estas vorto netrafa (por tio, kion ni al ĝia enhavo kutime atribuas), nekla-re kaj neĝuste la unuan fojon elpensita kaj uzita. Ĝi estis kreita eble laŭ uzo de germana vorto „wissen“, uzata en la senco: „ion scii“ kaj en la senco: „esti kapabla, taŭga ion fari“. La pola esprimo: „ja to potrafię“ enhavas la ideon: mi sentas en mi sufiĉe da forto, preparo, kono, scio por fari tion ĝuste, akurate, kontentige, bone, pli simple do: „mi kapablas, taŭgas, sufiĉas“.

Due eliĝas la demando, ĉu la sumo de du konceptoj ne formas vere ion novan? Laŭ mia kompreno du ideoj en unu vorton kunligitaj formas novan ideon enhavantan nuncon de ideo troviĝanta sur dua (fina) loko (ĝi estas ĉefa ideo) modifitan per la ideo staranta unualoke. Simila uzo regas en la germana kaj angla lingvoj; la pola lingvo ne estas tolerema por tiaj kunmetaĵoj. El la

Gia longo laŭmezure mejlojn sep kalkulas,
Kaj largeco sescent — ne pli — paŝojn nur
postulas.

Blanka aĵo malproksime estas pint' lanterna,
Kaj jen kontraŭ ŝipa beko duobla Jastarna:
Nia pucka, kie pola preĝej' lokon prenas,
Dua ree al Danciga urbo apartenas,
Antaŭtempe tiuloke laŭ rakontkombino
Oferdonis praloĝantoj al Jastra diino:
Ĉar dum tempo paska faris tion idolanoj,
Jastro nomas ĵus la paskon niaj paroĥanoj.
Jen pli fore kuŝas Kusfeld, poste la Cejnova,
Sed nek unu germanlingve tie parolpova,
La loĝantoj de vilaĝoj preter la Helanoj
Ĉiuj estas de la Poloj laŭkore landanoj.
Malproksime de si kuŝas fore vilaĝaro,
Ĉe kabanoj tre mallarĝa estas la kamparo,
Ĉar la arboj ja okupas preskaŭ landduonon
Vidigante laŭ landstrio longan pinan zonon.
Pri ampleksa la grundaro ni malzorgas tute,
Ĉar el maro la nutraĵon donas ret' riĉŝute.
La ĉevaloj ne ŝatataj en helana rondo:
Nin senpage veturigas ventoj ja sur ondo.
La kabanoj al fiŝista koro estas karaj
Pro konstruo el savitaj ŝiprestaĵoj maraj.
Tra fenestro videbliĝas de mastoj arbaro
Kaj fieras per superba alta pintĉaparo.
Helo estas plej feliĉa sur la ter' angulo:
Kiu havas kelkajn kutrojn, estas grandriĉulo.

La nobel' de Muj' la vortojn pie aŭskultadis.
Ĉar pri Hel' al si li tiom tute ne imagis.
Ŝip' surmare forrapidas kun blovita velo,
Kiun viroj ŝprucverŝigas per la arba ŝelo,
Ke la tolo rigidiĝu je pli granda povo
Kaj ne perdu tra teksaĵo iom da ventblovo.
Jen Ĉorlinski ekrimarkis post si kvazaŭ rokon,
Kiu el land' elkreskinte en mar' serĉis lokon.
Li demandis, ĉu jen roko, ĉu nur argilaĵoj.
Muĵa diris, ke kaŝubaj estas ĝi altaĵoj,
Tre konataj en la lando: unu ĉe Svajevo,
Pli proksima ĉe la Pucko, tria ĉe l' Oksevo.
Ili estis antaŭtempe per mar' ĉirkaŭitaj,
Nune estas per pov' Dia kun land' kunigitaj.
Sur altaĵo la Okseva loĝis antaŭ jaroj
Idolana dana princo fama pro glavfaroj.

Mi ne scias, ĉu kredinde, ke pro sia sperto
Li sin turnis al la sankta episkop' Alberto:
Se sanktul' kun kontinento la insulon ligos,
Li sin, siajn korteganojn kun popol' baptigos.
Tuj altaj' al firma tero alkroĉiĝis mire
Kaj la princo kristaniĝis kun popol' laŭdire.
Tradukis: Józef Orzech.

latina lingvo oni povus citi kompare la t. n. hendiadyoin, kie du ideoj estas kunligitaj per la konjunktio „kaj“, kaj tamen ili ne formas sumon, sed nuancon (ekz.: furor ac tela, ora vultusque = vizaĝesprimo, nudus atque inanis, evertere atque perfringere, pacta atque constituta)

Trie mi citas kelkajn verbkunmetaĵojn kiel argumenton por mia tezo pri novaj nuancoj tiamaniere gajnitaj: spionrigardi (t. e. rigardi ion por spioni, spione), rigardspioni (spioni ion per rigardado kaj ne ekz. per fotografado), ŝancelpaŝi: flaresplori (t. e. esplori flare kiel hundo), esplorflari (flari por ion esplori), lamentkanti, plendplori, ŝtelaliri, ŝaŭmboli, bolŝaŭmi, murmurpreĝi, preĝmurmuri, petolmoki, ŝercprovoki — kaj multegaj similaj.

Nature evitindaj estas kiel eraraj la kunmetaĵoj, inter kies partoj ekzistas logike kaj esence nenia ajn rilato, ekz.: banmanĝi, flatvestiĝi, gluteksi, veturkudri, ŝancelmoki, mondkreski, kiuj ĉiam estas nur senencaĵoj.

Por aliaj avertoj mi estas danka, ĉar ne havante tie ĉi la okazon por interparolado mi tiamaniere havas kontrolon kaj klarigon pri ĝusta lingvouzo.

Józef Orzech.

Korekto. Bv. korekti anoncon de „La Juna Vivo“, aperintan en la februara n-ro de P. E. La fina parto de la lasta frazo (pĝ. 22) devas teksti: ĉar por 4 32 zł. oni ricevas 8 ekz. plus la prezentaĵon.

LEO TURNO

Znane podręczniki p. t.:
Kompletny Podręcznik j. Esp.
Słownik esp.-pol. i pol.-esp.
Czytanki Esperanckie
Wyższy kurs j. Esp.
są do nabycia w adm. „Polskiego Esperantysty“ po 1 zł.
Konto P. K. O. 406.660.

**POSTISTOJ, TELEGRAFISTOJ
TELEFONISTOJ!!** La Interligilo
de l' P.T.T. via organo, 324 rue Lecourbe, Paris, 15e eldonas la tutmondan profesian adresaron vian. — Statutoj de Ilepito — nia historio — niaj gvidantoj — Niaj realigoj — niaj esperantistaj geko-

legoj laŭ urbo — Esperantis'a gazetaro — fakaj asocioj kaj fakaj organoj — La filatelia mondo — la teknikaj revuoj.
Unika dokumento!
Tuj informu — Senpage por ĉiu membro — senpaga specimeno de la organo laŭ peto.

kaj tie li propagandis polajn aferojn; li paroladis en kluboj, komercaj ĉambroj, antaŭ soldatoj kaj per viva vorto li favorigadis opinionon por Pollando. Sen troigo oni povas diri, ke al persona influo de Paderewski ni dankas 13 punkton de proklamo de Wilson.

Idealaro de Paderewski koncizigis en veksigalo: „Kunigita kaj sendependa Pollando“ — por tiu idealaro li sukcesis varbi prezidanton de Usono.

Kaj ree per elspezo de Paderewski ekstaris en Poznań monumento de Wilson, donacita al la nacio. Nedisigeble kunigis kun si du nomoj de du grandaj civitanoj.

El revoj pri sendependa kaj kunigita Pollando ekestis patriota kanto de Paderewski por vira horo: „Hej blanka aglo“, ununura komponaĵo, kiun li verkis detempe de la simfonio h-moll.

Venis jaro 1918. Paderewski venis Polujon, invitita kiel prezidanto de kabineto kaj prenis dokumentojn de ministro de eksterlandaj aferoj. Per sia nomo li akiradis al nia juna ŝtato moralan krediton en eksterlando. Lia politika misio finigis per malsukceso. Ne estas mia afero solvi, kial tiel farigis; mankas al mi por tio konvenaj kvalifikoj.

Paderewski forlasis la hejmlandon, revenis Usonon kaj ree komencis sian penoplenan migradon kiel apostolo de belelo, kiel interpretisto de poezio ensorcita en la muziko.

Koncertojn en Londono, Parizo, Svisujo, Belgujo kaj en Romo li dediĉis al militviktimoj de ententaj ŝtatoj.

Kaj ree aŭskultas lin amasoj, hipnotigitaj per ĉarmo de lia ludo.

Fluas sur lin plej grandaj honoroj, honoraj ordenoj, doktortitoloj de plej malnovaj universitatoj. Ĉie rekono, adoro kaj homaĝio.

Kaj li eterne juna, iras tra homamasoj en aŭreolo de gloro, diskonigante evangelion de beleco kaj evangelion de paco — li granda artisto, granda homo.

DR JÓZEF REISS.

IGNACY JAN PADEREWSKI — GENIA MUZIKISTO KAJ GRANDA PATRIOTO.

Agado de majstro Paderewski vekas miregon pro sia ĉiuflankeco. Tiam universalecon de menso ni renkontas nur ĉe homoj de renesanco.

Ekster Pollando Paderewski estas konata antaŭ ĉio kiel pianisto.

La nuntempa muziko rekonas lian grandecon kiel de komponisto.

Pollando honoras en li patrioton-civitanon, kaj samtempe neoficialan ambasadoron de polaj aferoj antaŭ eksterlandanoj.

Por tiel riĉa ĉiuflankeco estas necesa genia individuo. Eble plej trafe karakterizis Paderewskin fama franca komponisto, Kamilo Saint Saëns, dirante, ke Paderewski estas geniulo, kiu hazarde pianludas.

Sian famon ŝuldas Paderewski al virtuza kariero. Fundamentojn de muzika eduko donis al li konservatorio en Varsovo, pli ĝuste tiutempa muzika instituto, direktata de Apolinarij Kaŝki. Tie 12-jara Paderewski aliĝis al klaso de Rudolflo Strobl, konata eldonisto de instrukciaj piankompapanoj.

En 18 vivjaro li ricevis virtuoza diplomon kaj estis nomita instruisto de pianludo en tiu lernejo, kiun li ĵus finis.

Tamen baldaŭ li mem rekonis, ke li devas ankoraŭ lerni. Li forveturis Berlinon por studoj: Frideriko Kiel, ĉe kiu antaŭe lernis Sigismundo Noskowski kaj violonludisto Vladislav Górski, farigis lia instruisto de kontrapunkto, kaj Henriko Urban, postea instruisto de Miecislav Karłowicz, instruis lin pri instrumentado.

Por perfektigi en pianista tekniko veturis Paderewski al la plej bona tiutempa pedagogo en Vieno, Teodoro Leszetycki, majstro de pianludo.

Sub lia direktado priregis Paderewski ĉiujn sekretojn de virtuozeco.

La unua koncerto en Vieno, aranĝita kune kun fama pri-madono Paulino Lucca, estis triumfo de Paderewski kaj antausigno de tiu maloftega sukceso, kiu farigis vera legendo de lia virtuozita kariero. Ĝi estis antaŭ 45 jaroj. Kaj komencigis escepta en historio de muziko migrado de piaristo-sorcisto, vekanta ĉie saman admiron kaj kolektanta ĉie samajn homagiojn.

Post unua prezentado en Parizo Karlo Gounod, komponisto de "Faust", Kamilo Saint Saens kaj ĉiuj aliaj grandaj francaj muzikistoj, akceptis Paderewski'n kun plej granda raviteco kaj adoro.

Londono komence sintenis malfavore; nur en sferoj de plej eminentaj artistoj, poetoj kaj pentristoj trovis ludo en Paderewski konvenan rehon. Ĝuste tiam konata prerafaelito Burne Jones kreis tiun faman portreton de Paderewski, kaptinte reve-poetajn trajtojn de lia vizago.

Kaj la unua prezentado en Nov-Jorko antaŭ 40 jaroj! Amerika kariero de Paderewski estas ĝis nun unikaĵo de sensacio. Ĝi estas ia elrevita fablo, kiun elsorcis ne fantazio de artisto, sed plej reala realeco de vivo.

Por Ameriko Paderewski estas simbolo de poleco, kaj samtempe kiel pianisto li estas la plej alta instanco de artismo kaj plej alta mezurilo, laŭ kiu oni pritaksas valoro de al'aj pianistoj.

En jaro 1898 revenis Paderewski jam en aŭreolo de famo en hejmlandon. En varsovia urbdoma salonego bankedo aranĝita honore al li farigis potenca patriota manifestacio. Parclado de Paderewski poste rondradis kopita en polaj bien-domoj.

Sen troigo oni povas diri, ke ne ekzistas iom granda urbo sur ambau duongloboj, kie ne koncertis Paderewski; kie oni ne ebriligis sin per poezio kaj ĉarmo de lia ludo.

Paderewski ludis en Germanujo (esceptante Berlinon, kiun li ĉiam preterveluradis), ludis en Rusujo, ludis en Aŭstralio, sud-Ameriko, kaj eĉ li atingis finojn de Afriko kaj koncertis en Kaplando.

Jam de multaj jaroj Paderewski vivas fore de la hejmlando. Ankorau en tempoj de studado pasigadis li kiel junulo Ĥbertempon en Zakopane. Tie li ekkonis montaranajn melodiojn, kiujn violonludis por li Bartek Obrochta. Tiel ekestis populara "Tatra Albumo". En naiva maniero rakontis pri tio Obrochta mem: "Mi ludis al li multfoje. Li tiel tion kaptis kaj ŝtelis, ke tutan muzikon li faris el tio".

En tiuj naivaj vortoj kiom da vero!

Jes li efektive "elŝtelis" animon de nia popola muziko kaj forportis ĝin tien malproksimen, eksterlanden, kiel plej valoran trezoron, por firmigadi per ĝia sono kaj kvietigi per ĝi doloron de sia hejmsopiro.

En somera rezidejo svisa apud Lemano Paderewski vivas kiel magnato. Sed el granda kapitalo, kolektita per laciĝa verka laboro, li ne vivas sola. Kiel magnato malavare li disponas tiun kapitalon por bono de la nacio. Siatempe li fondis stipendion por komponistoj. En konkurso, aljuĝita en Dresden, ricevis premion: Henriko Melcer, Sigismundo Słojowski, Gregorio Fitelberg.

Memorinda jaro 1910, kvincenta jardatreveno de la Grünvalda venko! Dum julia soleno oni malkovris en Kraków Grünvaldan monumenton, verkon de skulptisto Antonio Wjwulski, starigitan per mono de Paderewski. Kiel oferon de koro donis la Majstro tiun monumenton al la nacio kaj en memento de malkovro aŭdigis flaman patriolan paroladon.

Kian oratoran forlon posedas lia vorto, pruvis tion lia parolado dum Chopinaj solenaĵoj en Lwów, ankau en 1910 jaro: "En Chopin prezentigās nia kolektiva animo de la nacio" — diris kaj tiun gvidlezon Paderewski disvolvis kun tia elokventeco kaj konvinka forto de argumentoj, ke ĝis nun lian paroladon pri Chopin oni devas konsideri plej profunda psikologia sintezo de Chopina muziko.

Rezidejo de Paderewski en Svisujo farigis trankvila haltejo por polaj elmigrintoj dum la milito. Komisite de "Komitato de Helpo" en Vevey, kiun prezidis Henriko Sienkiewicz, veturis Paderewski Amerikon, kie li komencis kolekti denacojn por militviktimoj en Pollando, kaj poste li disvolvis viglan politikan agadon: li paroladis dum propraj koncertoj

SKOLTA ANGULO.

IPSWICH.

Tendarloko de la XIV.-a S.E.L.-kunveno.

Pensante pri la kunvenloko de tendaro ni skoltoj ne nur konsideras la nuran tendarkampon, sed ankaŭ la ĉirkaŭaĵon. Por Internacia Skolta Tendaro ĉi tio estas eĉ pli grava. Tiuj, kiuj vizitos el eksterlando precipe volas scii, kiom da karakterizaĵoj de la invitanta lando prezentas la ĉirkaŭaĵo.

Sen risiko esti akuzata pri loka fiereco aŭ fanfaronado, ni anglaj skoltoj ja povas diri, ke invitante vin el eksterlando al Ipswich, ni proponas al vi enrigardon en intime anglan regionon.

Situante proksimume 20 km. malproksime de la maro, sur la rivero Orwell, kies buŝo estas ĉe la bone konata haveno Harwich, Ipswich nestas en trankvile bela pejzaĝo. Irante de la maro laŭ la rivero oni pasas tra kviete pitoreska kamparo, preter vilaĝoj kaj arbokovritaj deklivaj bordoj. De tempo al tempo preterfloras velbarĝoj plenaj de maizo aŭ aliaj produktoj, irantaj pelate de facila vento sur la ampleksaj ruĝaj veloj. Aŭ jen rodas granda vaporŝipo de iu fora mondparto, atendente konvenan tajdon por eniri la grandan dokon de la urbo,

aŭ malsarĝante grenon en ĉeflankajn barĝojn, se ĝi estas tro granda por mem eniri la kluzon.

Jen, nun malfermiĝas antaŭ la vido la granda urbo kun enloĝantaro de proksimume 90.000. Jam ni estas ĉe la kajo, kaj baidi marŝos sur la stratoj de tipe angla urbo, kies historio rakontas ek de la plej frua tempo. Generale tiu historio estas paca, almenaŭ de post la tempo kiam en la 10a jarcento danaj marabistoj minace postulis savpagon de £ 10.000 — kiu sumo mem atestas pri la tiutempa komerca signifo de la urbo.

Tra la jarcentoj ĝi adaptiĝis al la evoluantaj cirkonstancoj, kaj tenis sin en ekvilibra kreskado. La ĉefa historia figuro, kun kiu ĝi estas ligita, estas Kardinalo Wolsey, fama eklezia ŝtatulo de Henry VIII. Wolsey naskiĝis en Ipswich; kaj ankoraŭ restas pordo portanta lian nomon — la sola restaĵo de kolegio, kiun li planis konstrui tie, sed kies kompletigon malpermesis la reĝo post la falo de Wolsey el la patronateco de Henry.

El tiu renesanca periodo restas pluraj konstruaĵoj, el kiuj la tiel nomita „Antikva Domo“ kaj „Kristpreĝeja Domo“ estas la plej belaj — lasta staras en granda kaj bone prizorgata urboparko.

Tamen, Ipswich estas ankaŭ moderna, kaj enhavas plurajn fabrikojn. Estas bo-

3

En kio konsistas mistera ĉarmo de lia ludo?

Ek de debuto de Paderewski eksentis la muzika mondo, ke sur koncerta estrado aperis virtuozo de tute alia tipo kompare al virtuozo de malnova epoko. Paganini, Liszt, kaj poste Henriko Wieniawski, aŭ Antono Rubinstein reprezentis virtutecon, kiu apartenas al senrevena pasinteco: ili ravis per ekstera efekto, agis per akrobataĵoj de tekniko. Kaj Paderewski estas virtuozo. Sed brilema efekto ne estas lia celo. Lia ludo estas antaŭ ĉio profunda interpretado, estas personala travivaĵo, estas kvazau celebrado de diservo.

Ĉiufoja koncerto de Paderewski fariĝas solena misterio, en kiu sekreta fluido de certa agordo transfluas de inspiritaj sonoj al koroj de enaŭskultigintaj homamasoj.

Fiksiĝis en mia memoro tia koncerto de Paderewski en Kraków, kiam en jaro 1913, tuj antaŭ la milito, Paderewski koncertis dufoje. En salono de Malnova Teatro, destinita por 1200 personoj, tumultigis ĉiufoje pli ol 2000 personoj.

En streĉa atmosfero kaj solena agordo oni atendis la Majstron. Fine li aperis. Ĉiuj ekstaris. Dum senĉesaj aplaudadoj li kapklinis antaŭ la publiko, kvazaŭ senkuragiĝita kaj mirigita pro la ovacio. Kaj poste li ludis. Li plenumis sian kutiman repertuaron: do komponaĵojn de Bach, Beethoven, Schumann, Liszt kaj de Mendelson „Kanton sen vortoj“ — kaj fine li elsorĉis tiun inspiritan kanton, kiu ni ĉiuj atendis, t. e. de Chopin.

Ektintis sonoj de Mazurko a-moll, de tiu poemo je maltrankvile volviganta linio de melodio, plena de kromataj kurbiĝoj, plensarĝita de ornamoj kaj saturita per larmoj de rezigno.

Kaj pere de la muziko gutfluis doloro en korojn de aŭskultantoj kaj skuis ilin ploro, silentigata per nenio. Ekfluis larmoj pro nia doloro, pro nia turmento de la mallibero. La koncerta ĉambrego ŝanĝiĝis je ia sanktejo preĝoplana, forsonis tonoj de la muziko, kaj la ĉambrego ankoraŭ longe daŭris en sorĉa silento. Neniu kuraĝis rompi la solenan silenton per banala aplaŭdo.

* * *

naj cigaredindustrio, fabrikado de agrikulturaj maŝinoj, cerealaj produktoj, vapor-, oleo- kaj aerpremaj maŝinaj kaj multaj aliaj varoj

Sub la regado de vigla kaj progresema urba administracio la bezonoj kaj bonfarto de la enloĝantaro estas taŭge prizorgataj.

Ĉirkaŭe estas granda kamparo agrikultura; kaj ekster Ipswich mem la terkulturado estas la ĉefa industrio. La multaj apudaj vilaĝoj bildece prezentas scenojn de tipa angla vilaĝvivo. En ĉiu lerte facetitaj silikoj kaj ŝtono. La regiono, Orientanglio, estas aparte fama pro ĉi tiuj konstruaĵoj.

Do, se vi iel povos veni, estu certaj, ke vi neniel damaĝos la elspezon. Kaj, ĉu necesas diri, ke la Ipswich-aj Skoltoj kaj Esperantistoj faros ĉion eblan por agrablighi vian restadon inter ni? Do, por la 1936 jaro „Estu Pretaj“ kaj venu amase, por ke ni povu pli intime konatighi nian urbon kaj ĉirkaŭaĵon al vi kaj reciproke ĝui niaflanke vian konatecon!

E. D. Durrant.

Gazetara Korespondanto.

NI KOMENCAS..

Jen fine aperis en februara numero de P. E. sciigo pri Pollanda Kongreso Esperantista okazonta dum Pentekosto.

Bedaŭrinde kronprovizora programo neniam detalo, eĉ ne pri kotizo. Ni esperu, ke ĝi ne estos tro alta. Cetere ĝi ne estadis tia. Mi esperas esti ĉies esprimilo, petante la organizantojn aranĝi la kongreson sub precipa signo de serioza kaj intensa laboro. Du jarojn ni ne kunvenadis, kaj eble la venonta ankaŭ okazos nur post du jaroj. Do ni esperu, ke ĝi estos sufiĝrade vizitita. Ĉiuj pollandaj Esperanto-grupoj devas sendi al la kongreso siajn delegitojn eĉ se estos necese tion mone subvencii.

Jam nun prezentigaŝo okazos sendi siajn proponojn kaj instigojn al organizantoj, kiel ĝeneralajn, tiel rilate la programon. Permesu al mi fari komencon: ni proponas jam nun lasi en provizora programo lokon por kelkaj fakkunvenoj, ekzemple de U.E.A., P.E.A. ktp. Mi esperas, ke mian proponon subtenos ties centroj en Polujo, kaj ke pri tio ni legos en venonta numero de P. E. Al tio mi volus aldoni, ke estus dezirinde, se koncernaj anoj ne povos veni la kongreson, tiam ilin reprezentu aliaj de ili rajtigitaj personoj, povontaj ĝin partopreni. Tial la kunvenhoroj estu antaŭdestinitaj nek dum sama nek proksima tempo kaj nepre en la unua tago, por ke dum laborkunsido povu esti prezentitaj faritaj decidoj.

Inĝ. M. Chmieliński, Łódź.

Sian arton Paderewski servigas por idealo. Pri si li forgesas. Escepte li lokas en programo siajn komponaĵojn. Kaj ja li kiel komponisto okupas unuarangan pozicion.

Paderewski devenas el Podolio; postajn jarojn li pasigis en Volinio. El tieaj grenkampoj, el melankolio de tiea pejzaĝo naskiĝis poezio de muziko de Paderewski: Lia lirismo, lia elegia melodio.

Ĉar ĉiuj komponaĵoj de Paderewski, ĉer pianaj, kiel ekzemple populara „Legendo“, aŭ „Melodio“, aŭ „Nokturno“, kaj eĉ dancoj, kiel senegala „Menueto“, aŭ „Krakoviako-Fantazio“, aŭ precipe „Kantoj“, estas saturitaj per larva lirismo (komparu „Ekfluis miaj larmoj puraj, abudaj“).

Oni povus nomi Paderewski'n posteulo de romantiko: ĉar en li estas la sama sentemo, kiu karakterizas muzikon de la romantika epoko kaj simila, kiel tie, tekniko kaj formo. Krom lirikaj miniaturoj Paderewski ofte uzas formon de variacio, formon de sonato kaj teknikon kontrapunktan, precipe fugon. Tiaj verkoj kiel Koncerto a-moll, Fantazio pola, Sonato es-moll apartenas al ĉefverkoj de moderna pianmuziko.

Opero „Manru“, verkita antaŭ 30 jaroj sub influo de Wagner, ŝpinita sur romano de Kraszewski „Ekstervilaga kabanano“, nun reludata, perdis nenion el sia melodibelego. Granda Simfonio h-moll, kvazaŭ patriota rapsodo de 1863 jaro, estas lasta verko de Paderewski. La Majstro verkis ĝin ankoraŭ en jaro 1907 kaj de tiu tempo li eksilentis. Estus malfacile decidi, kio lin silentigis.

Estas eble, ke disvolvado de la hodiaŭa muziko. Ho, kiel aliajn vojojn iris la muziko de lastaj tempoj kompare al idealo, kiu lumis al generacio antaŭ la granda milito!

Tiun vojon de trokreskinta radikalismo Paderewski surprasigi povas, kvankam per kuraga harmonio li rimarkinde superis la samtempajn al li muzikon (ekzemple: „Dans le Désert“ kaj kanto al vortoj de Catulle Mendès). Fikrigardante idealon de Chopina beleco, li rekonas tamen ankaŭ valorojn de la nova muziko. Pruvo por tio estas Debussy, kies subtilajn poemojn enigis Paderewski en sian koncertan repertuaron.

*

*

*

HALINA WEINSTEIN, WARSZAWA,
str. Leszno 99 m. 5. P. K. O.-konto 27.867.
Tel. 598-37 akceptas abonojn por:

POLA ESPERANTISTO jare zł. 8.—;
duonjare zł. 4.—; kvaronjare zł. 2.—; opa
numero zł. 0.70.

LA PRAKTIKO jare zł. 8.—; duonja-
re zł. 4.—; opa numero zł. 0.70. Abona
jaro komenciĝas en januaro kaj julio.

LITERATURA MONDO jare zł. 15.50;
duonjare zł. 7.75.

LINGVO-LIBRO opa numero zł. 0.20.
INFORMOJ DE ESPERANTO-ASO-
CIO EN ESTONIO jare zł. 2.20; opa
numero zł. 0.20.

Nur ĉe mendo de unuopaj numeroj al-
donu por poŝtelspezoj 10%, minimume
zł. 0.10. Aĉeteblaj ĉiuj eldonaĵoj de Po-
la Esperantisto, Literatura Mondo, La
Praktiko ktp. Sendante monon bonvolu
precize indiki la celon de la enpago. Por
korespondajo aldonu poŝtmarkon.

R I M A R K O:

Literatura Mondo malaltigis la prezojn
de siaj eldonaĵoj ekde januaro 1936.

Detalaj prospektoj pri la Encikloped'o,
katalogoj de Lit. Mondo kaj prospektoj
pri aliĝo al AELA (Asocio de Esperan-
tistaj Libro-Amikoj) estas dissendataj
senpage. Aliĝojn kaj mendojn por la li-
broj kaj abonon por Literatura Mondo
SENDU AL LA SUPRE MONTRITA
ADRESO.

Ree ekaperas la monata gazeto

F R A T E C O

Unika en Esperantujo, kiu portas altan
idealon, propagandas laŭnaturan vivadon,
pacideojn, kontraŭmilitarismon kaj kona-
tigas al siaj legantoj la fundamentajn na-
turajn leĝojn el kiuj la nuntempuloj flan-
kiĝis.

Abonkotizo 1 frsv., 3 internaciaj res-
pondkuponoj kaj ĉiu egalvaloro.

Adreso: Redakcio Frateco, Sevlievo,
Bulgarujo.

Postulu specimenon.

11-AJ INTERNACIAJ OLIMPIAJ **LUDOJ**

Estas konate, ke en Berlin fondiĝis
komitato por servi al ĉiuj Esperantistoj,
kiuj intencas ĉeesti la Olimpiajn Ludojn
en Berlin 1936.

La estro de la komitato estas s-ro
Walter Dempwolff, Essener Strasse 13,
Berlin NW 21.

Li estas nomita de Germana Esperan-
to-Asocio por plenumi ĉiujn aferojn, kiuj
koncernas la Olimpiajn Ludojn. Al li bon-
volu sin turni ĉiuj interesitoj, kiuj de-

ziras skribajn informojn pri la O. L. E-
stas dezirinde, ke kiel eble plej multaj
Esperantistoj skribu al s-ro Dempwolff,
ĉar tio helpos fari efikan propagandon
ĉe la kompetentaj institucioj germanaj.
Por respondo oni bovolu aldoni interna-
cian respondkuponon.

Dum la daŭro de la O. L. la komitato
funkciigos informojn por Esperantistaj
vizitantoj, en kiu eksterlandaj samidea-
noj dum la tuta tago trovos ĉiun helpon
rilate al O. L. (gvidadon tra Berlin ktp.).
La informejo troviĝas en

Tramondo-vojaĝoficejo Friedrich Eller-
siek, Saarlandstr. 18, Berlin SW 11 (Tel.
A 9 Blücher 0656).

Esperantistoj, kiuj vizitos la O. L., a-
noncu sin krom al la Olimpia Komitato
ankau al s-ro Dempwolff.

La Berlinaj samideanoj faros sian e-
blon por agrabligi al la gastoj la resta-
don en la germana ĉefurbo.

Kvar paŝojn antaŭen

faras la regule aperanta, dumonata,
popolsciencia revuo

SCIENCA GAZETO

Jen la novaĵoj por la jaro 1936-a (la
5-a de Sciencia Gazeto):

1. Ĉiu numero havos 24 paĝojn (ne kal-
kulante la kovrilon).
2. La unua parto de ĉiu numero (longaj
artikoloj) estos presata per pli grandaj
literoj.
3. La gazeto estos ilustrata.
4. De nun ni sendas specimenon senpa-
ge. Nur petu ĝin.

Jarabono: 1 dolaro usona (3 sv. fr.)

Amerika Esperanto-Instituto,
556 State St., Madison, Wis., USA.

AELA—noj ATENTUI

La 6-an de februaro ni ekspedi's al ĉiu
aboninto por serio C/1935. la volumon
de Lejzerowicz: „El la Verda Biblio“. Ĝi
estas la kvara libro por 1935. dissendita.
Aldone ni sendis la 3-an numeron de Lin-
gvo Libro.

En februaro sekvos kvar aliaj volumoj.
Nericevintoj bonvolu reklamaci.

L LEJZEROWICZ: El la Verda Biblio
Babiladoj kun Horaĉo Serĉer. Humoraj
skizoj el la vivo de Esperantistoj. Ilu-
strita de R. Laval. 104 paĝa, formato
13,5 x 11,5 cm. Eldonis Literatura Mon-
do, Budapest. Prezo broŝ. svfr. 0.90, tol-
bindita svfr. 1.50 plus 10% por sendko-
stoj. Dua volumo de literatura serio de
AELA 1935.

Teatraĵetojn, dialogojn, melodiojn esperantigitajn intersanĝe aŭ kontraŭ repaĝo pruntepetas franca grupo. Sufiĉa adreso: Esperanto, DUNKERQUE (Francujo).

LA LYON'A FOIRO ELDONAS NOVAJN PRESAJOJN EN ESPERANTO.

La Lyon'a Foiro ĵus sendis al ni:

1) Novan afiŝon kun esp. teksto; ĝi estas kvinkolora kaj mezuras 60 x 10 cm.

2) Novan prospekton en esperanto. Ĝi estas sespaĝa, dukolora kaj ilustrita per desegnaĵoj kaj fotografiaĵoj.

3) Belan kvardekpaĝan broŝuron eldonitan de la Lyon'a Turisma Oficejo kun klarigoj en esperanto.

Al ĉiu petanto, la Lyon'a Foiro sendos senpage tiujn presadojn, kune kun kelkaj sorbpaperoj kaj ilustritaj poŝtkartoj.

Sin turni: Foire de Lyon, Esperanto-Fako, Rue Ménestrier, LYON, Francujo.

S. T. E. P.

Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo, kies prezidanto estas Bronisław Wyszyński, konsilanto en Trafikministerio (Turisma Fako), donas al eksterlandanoj necesajn informojn pri pola turismo, servas per informoj kaj laŭebla helpo al turistoj, dezirantaj vizi polan landon, kaj al sportuloj, alvenantaj Polujon por partopreni diversajn sportkonkurojn.

S. T. E. P. volonte organizos kun diversaj landoj intersanĝajn ekskursojn, kaj invitas eksterlandanojn viziti Polujon. Ĉiuj ekskurso kaj interesatoj bv. sin turni al sekretario de Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo, Varsovio, str. Leszno 99 m. 5. Tel. 5-98-37.

Ĉiuj gazetoj estas petataj represi. La koncernen gazeton ni petas havigi al ni.

POLLANDA KRONIKO.

CHORZÓW. Rondo Esperantista aranĝis la 2. II. sian ĝen. kunvenon. Oni elektis jenan estraron: — Prez. Kołodziej E., Vicprez. Kornelius R., Sekr. Garbaczek, 2-a sekr. Paluch, Kas. Matias, 2-a kas. Ekert; Bibl. s-ro Marzec. f-ino Borgiel; Kons. Kłyk, Zięć; Rev. Kom. s-roj: Tyła, Szyma, Dworok. — La ekzercvesperoj okazas ĉiun vendredon je la 19—21h en la ĉambro XII. ĉambro 14, ul. Katowicka 24. Alilokaj samideanoj estas ĉiam bonvenaj.

KRAKÓW. La 9. I. 1936. nia Societo Esperanto gastigis en la bela kinoĉambro de Muzeo Industria aranĝitan de s-ano Schnützer el Lwów Wagner-vesperon, okaze de la 60-jara jubileo de la Wagner-teatro en Bayreuth. La luksa programo de la vespero anoncis: 1. Antaŭvorton de prof. Odo Bujwid, 2. prelegon de s-ano H. Schnützer pri la vivo kaj kreado de Richard Wagner, 3. lumbildojn. Post la paŭzo Wagnerajn kantojn kaj ariojn el la famaj operoj, produktitajn de oper- kaj dramartistinoj: Stanisława Wiśniewska, Romana Pawłowska kaj Marja Fehérpataky. Pleje aplaudata estis la kantisto Czesław Kozak, kiu kantis arion el la dua akto de Tannhäuser kaj kanzonon al la stelo de l' vespero. Akompanis fortepiane s-oj prof. Gaczek kaj Jan Hoffman.

S-ano Schnützer preparas nun novan koncertvesperon, nome: hispanan, kiu espereble montriĝos eĉ pli bonsukcesa ol

la Wagnera, kiun ja ĉeestis konsuloj eksterlandaj kaj kelkaj aliaj gravuloj.

La 6. II. 1936. okazis en la sama ĉambrego aranĝita de „Soc. Esperanto“ senpaga provleciono de Esperanto fare de dro Dreher, kun lingvoinstruaj lumbildoj kaj disaŭdigoj. Antaŭvorton diris prof. Bujwid.

WARSAWA. Merkrede la 12. II. 36. okazis en la propra loĝejo la ĝenerala jarkunveno de l' Esperantista Rondo „Konkordo“ en Varsovio. — La raporto de l' estraro pri tutjara agado konsistis el raportoj de la sekretario, kasisto, bibliotekisto, delegito al Intersocieta E-Delegitaro kaj de la Revizia Komisiono. — En la novan estraron estas elektitaj: dr. Krenicki I., s-roj Kurjański F., Lindensztat J., f-ino Muszkatblat P., f-ino Szenfeld M., s-ro Weinthal B., Wiesefeld E. Kiel anstataŭantoj: f-inoj Fiszlewicz R., Cukierman H. Edelbaum H. En la Rev. Kom.: dr. Krenicki J., inĝ. Płoniskier M., Różanykwiat A.

Presdiablero kaŭzis, ke en la februara n-ro de P. E. aperis nur parto de l' kroniko de la grupo „Konkordo“. Nun ni trovis pluan parton, kiun ni prezentas. Tute vere estas, ke la Red. ne helpis la diableton, sed ĝi spontanee ekagis, eble tial, ke la raporto estis multege tro longa, ol — necese.

Ekparolas s-ino Cense. Dum preskaŭ 45 minutoj ŝi ravis niajn orelojn per be-

legaj Esperanto-tonoj. Bedaŭrinde iom da pesimismo blovis el ŝia parolo.

Kvazaŭ por tute refuti ŝian opinion, s-ro Julian Jarecki donis al ni la eblon ĝui la belegan esp-an deklamarton, per kiu li diversnuance, praktike, pruvis la grandegajn sukcesojn jam ĝis nun akiritajn en la E-o-poezio kaj lingvo, kiu, kiel diris Beaufront, taŭgas por ĉio, do ne povas esti al nenio.

Laste s-o Wiesenfeld, por ke la publiko ne disiru sub la pesimisma impresado de l' vortoj de s-ino Cense, d'ris ankaŭ kelkajn vortojn: S-ino Cense pardonu, se mi ne partoprenas en ŝia pesimismo. La Biblio rakontas, ke kiam Dio intencis pereigi Sodomon kaj Gomoron, Li intertraktis kun Abrahamo, kiu pledis, ke Dio ne pereigu tiujn urbojn. Kaj se — diris Abrahamo — en Sodomo aŭ Gomoro troviĝus 100 piuloj, ĉu Ci ankaŭ pereigos tiujn urbojn? — Ne — respondis Dio — se estos cent piuloj,

mi ne pereigos. — Kaj se naŭdek? — marĉandis Abrahamo. — Ankaŭ ne respondis Dio. Kaj se okdek? sepdek ktp. marĉandis Abrahamo. Laŭ la komentario de l' Talmudo restas ĉiam en ĉiu generacio, en ĉiu mondo 36 piuloj, pro kies meritoj Dio ne pereigas la mondon.

Tridek ses!

Kaj jen — rigardu sinjorino: en tiu ĉi salono ĉeestas pli ol kvindek... Ĉu do Esperanto pereos?!

Sinjorino Cense leviĝas kaj laŭte, plenkulme deklaras: „Mi estas optimisto“.

Kaj ĉe bonagordita ĝenerala animstato la Prezidanto dankis la ĉeestantaron kaj ankaŭ la estraron de „Konkordo“ pro la aranĝo de l' unutaga — dum la tuta jaro — festo, kiam ĉiuj Esperantistoj forĝegas pri ĉio ilin disiganta, sed memoras nur pri tio, kio ilin kunigas. Festo de reciproka amo! Vera festo de Esperanto!

IMPRESOJ EL EKSKURSO AL LA DEZERTO EN AFRIKO.

Aŭtobusoj jam atendis nin. Ni deziris viziti la urbon Gasr-Gárian. Por vidi tiun urbon ni devis travojaĝi la dezerton. Suna ardo estis preskaŭ ne suferbla. En Tripolio la termometro atingis en la suno kelkdek gradojn de Celsio. Ĉe aŭtobusoj staris Araboj, vendante glaciajn, kiun la esperantistoj aĉetis. Kompreneble, ĉiu volis esti la unua kaj petis pri glaciaĵo, ĉar nia lango estis seka kaj la buŝo soifanta. Apenaŭ ni kapablis akiri glaciaĵon en la manon, tuj ĝi fluidiĝis.

Ni forlasis Tripolion. La vento kaŭzita per movo de aŭtobusoj brulvundis niajn vangojn. Niaj gorgoj estis sekaj. Ni proksimiĝis al dezerto. La varmego pligrandiĝis. Ĉie kie oni rigardis, estis nur flava, seka sablo, de koloro, kiel ĉe ni argilo. De tempo al tempo oni vidis solan malgrandan olivarbon. Dumvoje ni renkontis karavanojn de beduinoj, kiuj nomadas sur kameloj kun ilia tuta posedaĵo. — Serioze, malrapide moviĝas antaŭen kameloj, lacigitaj per vojiro kaj bruliganta suno. Beduinoj estas vestitaj en blankaj manteloj kaj tiaj samaj turbanoj. Ili sidas sur kameloj aŭ iras piede apud ili, serioze, ne parolante. Nenie ni vidis virinojn nur solajn virojn.

Ni proksimiĝis al oazo. De malproksime ni vidis palman arbaron. Palma arbo fiere, alte suprenlevas sian kronon kaj sur ĝi pendas daktiloj. En Afriko palmoj havas grandan amplekson. Sur iliaj

pintoj suprenleviĝas larĝaj, flavaj (ĉar ili estas bruligitaj de suno) folioj.

En oazo estas multe da olivujoj. Unu staras ĉe alia, kaj tio aspektas, kiel juna, antaŭ nelonge plantita, arbaro.

Soforo vidante alproksimiĝantan oazon, pligrandiĝas la rapidecon de aŭtomobilo. Li estas ankaŭ soifanta. Mi faris tiun ekskurson kun unu Norvegino, kiu kunprenis vinberojn kaj de tempo al tempo donis al mi unu vinberon. Mi tenis ĝin longe en la buŝo kaj mi rigardis kun sopiro al poŝego, en kiu troviĝis bonaj, sukplenaĵaj fruktoj.

Ni estis fine en oazo. Ĉiuj kuris al butiko, kie oni vendas oranĝojn, bieron. Ĉio estis varma, tamen tio ne malhelpis, ĉar ni havis sekigitan buŝon. Mi estas certa, ke se oranĝaĵo havus cent gradojn da varmo, ĉiuj trinkus ĝin glute, ne atentante tiun temperaturon. Ni petis pri glacio. Aperis knabo kun plado da glacio. Forĝesante pri higieno ni prenis ĝin per niaj manoj, por ankaŭ ilin refreŝigi. Malgranda Arabo petis min, ke mi akiru por li peceton da glacio. Kiam mi sukcesis tion fari por li, la knabo ekkriis de ĝojo, kvazaŭ mi donus al li grandegan sumon da mono.

Antaŭ butiko staris itala policisto, kaj beduinoj sidis turke, kiel ŝtonigitaj statuoj kun duonmalfermitaj okuloj, flavaj de suno, en blankaj, pli ĝuste en grizaj ĉemizoj, kovritaj per polvo. Krom tiuj

ĉemizoj ili estas ĉirkaŭvolvitaj per felto de ventro ĝis la kapo. Ili sidis ne zorgante pri iliaj kameloj, kiuj tiel same, kiel iliaj sinjoroj estis lacaj. Manĝante paŝtaĵon, la kameloj ne bonvolis suprenleviĝi, sed kvarpiede antaŭenŝoviĝis, aŭ alte streĉis siajn kolojn, kaj manĝis pinĉante plantojn. Tie mi vidis unu kaj du ĝibajn kamelojn.

Ĉe tiu butikoj troviĝis puto kaj ĉi tie ĉerpas Araboj en felan sakon rezervon da akvo. Kelkaj beduinoj vivtenas sin, vendante en la dezerto, tiun akvon el sako. — Ĉu apetita estas tiu akvo? Mi povas al vi diri, ke mi ankaŭ prenis malmulte da akvo el puto en botelon, sed la akvo estis tiel malapetita, kaj varma, ke mi abomene forverŝis ĝin sur teron.

Vidante nin, kunvenis infanoj de ĉirkaŭaĵo; mizeraj, portantaj nur cemizojn malpurajn kun malsanaj pliparte okuloj. Svarmoj da muŝoj multobliĝis de minuto al minuto allogitaj per karavanoj de kameloj. La plej ŝatata loko de muŝoj estas pusaj okuloj. Beduinoj kaj infanoj ne forpelas ilin sed atendas pacience, ĝis kiam la muŝoj volas favore forlas tiun lokon.

Ĉirkaŭe troviĝas belaj eŭropaj domoj, kiuj posedas supre malgrandajn vitrajn fenestrojn, direktitajn al la vojo. Ceteraj fenestroj estas direktitaj interne al ĝardeno. En tiuj domoj havas Araboj siajn haremojn. Araboj estas tre ĵaluzaj koncerne al siaj edzinoj. Edzino de riĉa Arabo ne montras sin sur la strato, eĉ dum la tago sen gardo. Malriĉaj inoj, kiuj estas devigitaj perlabori por la vivo, aŭ la servistinoj de riĉaj Araboj, eliras havante du aŭ unu okulon malfermitan. Sed la vizaĝo estas tute kovrita.

Post momenta kvietigo de la soifo ni niras en aŭtobusojn por vojaĝi antaŭen. Mi forgesis diri al vi, ke la vojo kondukanta tra tuta dezerto estas tre bela ŝoseo, kiu povus troviĝi en la plej granda eŭropa urbo. De malproksime aspektas tio, kiel spegulvitro, en kiu trarigardas sin palmoj kaj olivujoj, troviĝantaj sur-voje.

Plue ni renkontis Arabojn sur belaj malgrandaj ĉevaloj kun tre bela jungafo, kaj kur selo inkrustita per multekostaj juveloj. Fiere ili suprenlevas siajn kapojn kaj kvankam ili sentis, ke la tuta ekskurso rigardis ilin, ili ne turnis la kapon. — En alia loko, en oazo mi vidis dikan Arabon sidantan sur azeno ŝarĝita per fojno. Kun kompato mi rigardis

tiun beston, kiu portis pezon kaj mastron.

Intervoje ni preteriris domojn de malriĉaj Araboj t. e. pli ĝuste budojn, mizere konstruitajn de ladaj kestoj, kartonoj kaj ĉifonoj. En oazoj antaŭ domoj estas kulturataj kampoj ĉirkaŭbaritaj per heĝoj el kakttoj je larĝaj folioj kaj grandaj dornoj. Tio formas ŝirman remparon antaŭ homoj kaj sablo dum apero de terura uragano „samum“, kiu ofte furiozas en la dezerto. Ho ve, al la karavano, kiun „samum“ renkontas! Tiun teruran ventegon la vojaĝistoj antaŭvidas kelkajn horojn pli frue, ĉar la suno antaŭ tiu terura uragano ruĝiĝas, kiel ardanta karbo. En mallonga tempo proksimiĝas nigraj nuboj. Terura malheleco ĉirkaŭas la teron. Subite ekestas uragano, kiu ĝemas kaj bruegas. Fluga sablo leviĝas en aero kaj formas nubon de polvo. Eĉ ŝtonoj kaj rokoj ne povas rezisti kontraŭ terura torento, kiu rulas ilin sur la tero. Amaso da kreskaĵoj kaj elŝiritaj arbestoj turniĝas en sufoka aero, kaj teruro kaj minaco penetras ĉiujn vivantajn kreaĵojn. Neniu vesto povas ŝirmi kontraŭ tiu fluganta sablo, aspektanta kiel ardigita karbo, kiam „samum“ leviĝas. Tra vestoj ĝi atingas la haŭton kaj kaŭzas teruran doloron, kiel de brulvundo. Varmega vento tute sekigas akvon en sakoj kaj felon sur ĝi, tiel forte, ke la felo rompiĝas. Tio sama fariĝas sub influo de la vento kun haŭto de bestoj kaj homoj. Tiuj vundoj estas plensutitaj per leviĝanta en aero sablo, kiu faras grandegan doloron. Kameloj mem haltas kaj turnante sin en direkto kontraŭ uragano, genuas kaj eltiras longajn kolojn sur sablo, kaj rigardas konfidplene la estron, de kiu ili atendas savon. Sed senforta dum tiu terura ventego, la homo mem tremas de timo.

Malmulte da personoj povas elteni „samum“ Ofte tuta karavano mortas. Poste sovaĝaj bestoj aŭ birdoj manĝas karnon de kadavroj; la sola postsigno de karavano estas aro da blankigitaj per suno ostoj.

Eĉ se la vojaĝo sukcesas, malriĉaj piedirantaj migrantoj multe suferas intervoje. Post kelkaj horoj de fortojn elĉerpa vojo atendas ilin vespere ripozo sur tero, kie ili disternas felojn aŭ litkovriilojn kaj la tuta nutraĵo konsistas el iom da rizo, daktiloj kaj malmulte da akvo. Sed kia akvo? Se ili ne trovas oazon ili devas kontentiĝi per akvo, kiun ili

en fela sako portas kun si. Tiu akvo kaŭze de varmego de dezerto atingas en la suno 60 ĝis 70 gradojn, ĉar ĉiuj objektoj ricevas temperaturon de aero. Nur la homo kaj besto havas normalan temperaturon.

Mi devas atentigi vin ke la akvo en la sako, en tiel granda varmego multobligas mikroskopajn vivaĵojn, kiuj en milionoj svarmas en ĝi, kiel en ĉiu staranta akvo. Kaŭze de la felo, la akvo ricevas malagraban odoron kaj guston. Pli feliĉa ol homo estas en tiu vidpunkto la kamelo. Trinkante el la puto ĝi pleniĝas stomakon per rezervo da akvo. De stomako dum ĉiu klino de kolo fluas malmulte da akvo al la buŝego kaj refreŝigas sekan langon. La turmento de la scifo estas tiel terura, ke oni ne povas ĝin kompari kun la turmento de maŝato. Oni rakontas, ke malfeliĉaj vojaĝistoj maltrankviligataj de la soifo ofte decidas mortigi kamelon, la solan amikon, sed kiu ili ne povas travojaĝi la dezerton, por ke nur la akvo, troviĝanta en ĝia stomako, aŭ per la sango, almenaŭ por mallonga tempo kvietigi la soifon, sed tio ne estas la vero.

Oni povas bone kompreni ĝojon de beduinoj, kiam ili lacaj post terura uragano ekvidas malproksime deziratan oazon.

Trairante la dezerton ni alproksimiĝis al Libiaj montoj. Tio estas ĉeno de montegoj, kiuj rememorigas piramidojn, starantajn unu ĉe alia. Fine ni estis en Gasr-Gárian, urbo, kiu nombras cent mil loĝantojn. Niaj aŭtobusoj alvenis antaŭ hotelon, kiu estas moderne aranĝita. Ni trovis tie nigrajn servistojn kaj kovritajn por ni tablojn.

Antaŭ ol ĉiuj aŭtobusoj alvenis, ni iris al centro de la urbo, de kiu oni aŭdis la monotonan sovaĝan muzikon. Ni vidis tie grandan amason da kameloj, Araboj, Beduinoj, kiuj alvenis al la urbo. Ĉie estis multe da palmoj kaj olivujoj. La suno subiris kaj antaŭ niaj okuloj montriĝis milionoj da steloj sur la ĉielo. Proksime blankis la itala urbdomo, apud kiu troviĝis eŭropa kafejo kun tabloj ekstere. — En la loko, de kiu oni aŭdis la muzikon estis kelkdek personoj: negroj, Araboj kaj italaj oficistoj, kiuj observis dancantajn negrojn. Dancistoj estis vestitaj en malpuraj faldaj roboj, kun ĉifono ĉirkaŭ talio. Ĉiuj estis dekoritaj per kelkaj ŝnuroj da koraloj kaj falsaj ŝuveloj; en oreloj pendis longaj orelringoj. La dancistoj ne estis junaj, ĉar grizaj lipharoj ĉirkaŭis iliajn lipojn. Ili dancis ŝovan-

te du paŝojn antaŭen kaj du paŝojn malantaŭen. ludante sur siaj instrumentoj, senĉese unu kaj la saman takton, kaj ekkriante sovaĝe. Tio daŭris preskaŭ tri horojn, ĝis kiam ili falis preskaŭ mortlaciĝinte. Sed nelonge ili ripozis, kiam ni ekforlasis la urbon eksonis denove la sovaĝa monotona muziko.

En unu flanko dancis tiuj sovaĝuloj, dum el la hotelo muziko de radio rememorigis nin, ke nun estas dudeka jarcento. La jarcento de kulturo kaj diversaj eltrovaĵoj.

Unu parto da esperantistoj veturis dek kvin kilometrojn pli malproksimen, por viziti domojn de malfeliĉaj negroj. Iliaj domoj estas grotoj, en kiu loĝantaro kaŝis sin antaŭ brulanta suno. Nenion mi vidis interne, nur en angulo estis jetitaj ĉifonaĵoj. Oni ne volas kredi, ke en nuna tempo la homo povas tiel primitive vivi. La homoj eliris el iliaj kavernoj, ĉar estis vespero. Malpuraj, nur en ĉemizoj. La negrinoj kun la infanoj ĉe brustoj rigardis nin apatie.

Ni devis reveni sur la ŝipon, ĉar estis jam malfrue kaj ni devis traveturi tiun saman vojon. — Nek poeto, nek pentristo povas en realaj koloroj redoni la belecon kaj misterecon de tiu sovaĝa naturo. Dum plenluno, kiam ankaŭ steloj hele brilas, sur la fono de flava sablo suprenleviĝas nigraj siluetoj de palmoj kaj olivujoj. Multe da karavancj elveturas vespere antaŭen, ĉar tiam estas la aero pli malvarma. Blanke vestitaj beduinoj sur la fono de la nokto aspektas mistere. — Vera fabelo el mil kaj unu noktoj.

Olga Goldmanówna (Kraków)

VII. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO.

Adreso: P.E.D., Kraków, ul. Lubicz 34.
Kotizo: zł 4.—, por familianoj, studentoj zł 2.—, por senlaboruloj kaj blinduloj senpage. Konto P.K.O. Nr. 411.404 (Delegacia Esperantystów w Polsce).

Fervojrabaton prizorgos P.E.D.

Blindulkaso: por helpi al blinduloj multenombrian partoprenon estas danke akceptataj mondonacoj.

Loĝejoj: pro multnombra vizitado de Kraków en tiuj ĉi tagoj estas necesa frua mendo.

Organiza Komitato.

Samtempe kun la Kongreso okazos en la tagoj de 31. V. — 1. VI.

GENERALA KUNVENO DE P. E. D.

En ĝi rajtas partopreni la aliĝintaj gru-

poj per siaj rajtigitaj reprezentantoj. Ĉiu reprezentanto devas posedi skriban rajtigon, en kiu estu citita nombro de la membroj. Ni atentigas, ke laŭ art. 10 § 2 membroj, kiuj ne pagis la kotizon, ne rajtas voĉdoni.

Tagordo: 1. Raportoj, 2. Decido pri la enskribpago kaj kotizo, 3. Fikso de la sekvanta Ĝ. K., 4. Elektoj, 5. Demandoj kaj proponoj. Proponoj pri la tagordo devas esti senditaj 2 monatojn antaŭ la Ĝ. K.

Art. 26. § 1. La Ĝ. K. estas decidopova, se la ĉeestantoj rajtigitaj al voĉdono reprezentas minimume 1/4 da ĉiuj voĉoj, per kiuj disponas ĉiuj membroj de P.E.D. kune.

§ 2. Se la Ĝ. K. ne okazus pro manko de la nombro necesa laŭ § 1, devas la Estraro en du sekvantaj semajnoj kunvoki denove la Ĝ. K., dum kiu la decidoj estas alprenataj sendepende de la nombro da reprezentitaj voĉoj. Al tiu ĉi nova Ĝ. K. ne validas normoj de art. 21 §§ 1 kaj 2 art. 25 § 3 alineo 1.

Estrado de P. E. D.



JOHN MERCHANT ROBERT KREUZ

Treege gravan perdon ricevis la Esp.-movado dum kelkaj lastaj semajnoj. La 9-an de januaro mortis s-o John Merchant, malnova Esp-isto, okupinta la plej elstarajn lokojn en niaj organizaĵoj. Li estis prezidanto de la Internacia Centra Komitato de la Esp.-Movado. Dum la Stockholma kongreso oni elektis lin prezidanto de U.E.A. Partoprenintoj de la Universalaj Kongresoj havis plezuron admirati lian spritan parolmanieron. Multaj polaj samideanoj certe memoras lin el la kongreso en Kraków, 1931.

Nur kelkajn semajnojn poste forlasis niajn vicojn s-o Robert Kreuz, direktoro de U.E.A. Kune kun s-ro Merchant ili ambaŭ apartenis al la plej gravaj aŭtoritatoj en nia movado.

Ili restu por ĉiam en nia memoro kiel meritplenaj pioniroj kaj talentaj propa-

gandistoj de la Esp.ideo. Ni honoru ilin en nia memoro!

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA celas propagandi kaj apliki la internacian helplingvon Esperanton en la sciencaj kaj teknikaj rondoj kaj faciligi ĝian uzadon per ĉiuj rimedoj. Samideanoj aliĝu al ĝi! Ĉiu membro ricevas presitan bultenon de la Asocio, enhavantan interesajn artikolojn. Jara kotizo estas 15 fr. fr. (=5.25 zł), sendotajn al s-ro Marcel Daniel Dupuis, ĝenerala sekretario de I.S.A.E., 56 Rue de La Rochefoucauld, Paris 9-e, France.

Ĉiuj sciencamantoj devas fariĝi membroj de I.S.A.E.

Nepre aŭskultu la radioprelegojn en la polaj stacioj, anoncitajn en la febr. n-ro de P. E. Vi povos tiel ekscii pri la plua programo, kiu nun ne estas al ni konata. Skribu kaj danku al Polskie Radio, Warszawa.

Ĉu vi jam respondis la enketon de Polskie Radio? Nepre faru kaj farigu tion laŭ niaj indikoj en februara n-ro de P.E. paĝo 25.

POR KURSGVIDANTOJ!

Bonege konservitan, kompletan, antikvecan kursmaterialon laŭ Ĉe-metodo, bezonegan por kursgvidantoj havigu ĉe „Pola Esperantisto“, Kraków, Lubicz 34. Prezo zł. 18.— kun aŭfranko.

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto“ uskutecznić można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABONANTOJN, SULDANTAJN ANKORAU LA ABONON POR J. 1935, PAGI LA SULDON JE NIA KONTO PKO No 406.660.

Zawiadamiamy, iż „Ondo de Daŭgava“ nie będzie wydawane w roku bieżącym.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. -- KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

